

# *Demandoj kaj respondoj pri Oomoto*

## **1. Kial necesas religio?**

Oni emas forgesi la ekziston de religio, same kiel oni facile forgesas, ke propra vivo nun daŭre ekzistas. Dum vi ne konscias, reale via vivo ekzistas. Tutsame Dio ekzistas kaj ĉiam Dio gardas nin dum nia nekonscio. Kompreni tiun ĉi fakton kaj kredi veran Dion ja estas la kialo de religia ekzisto. La instruo montras, ke la vera religio estas jen lumo, jen vivo, jen granda motoro por homa vivaktiveco.

Religio havas povon fari ĉiujn homajn aferojn ideala, pura kaj ĉielregna, kaj ĝi ankaŭ povas plibonigi kaj plitrankviligi iun personon, iun familion, iun nacion kaj la tutan mondon. Per ĝi oni unuafoje povas akiri vere ekvilibrajn koron kaj vivadon.

Kial religio estas necesa, se dirite realisme, estas tial ke kredo je Dio portas al homo fortan kaj sanan korpon kaj dekateniĝon de kora sufero, al familio disvolviĝon, al la mondo prosperon kaj cetere al ties ĉiuj flankoj pliboniĝon.

## **2. Mi pensas ke aliĝi al religio estas eskapi el vivo. Ĉu ne?**

Post la aliĝo al religio, tiu homo, kvankam nevidebla per la okuloj, povas eniri en la vivdaŭron gardatan de granda forto de Dio. Sekve tiu ĉiam emas kun bonvolemo rigardi aliajn kaj socian staton. Tial, ŝajnas, tiu estas, en la okuloj de senreligiuloj, ia eksterulo de homa

socio, kaj lasus iluzion eskapi el la severa homa socio. Sed la religio esence estas la origina forto de la homviva aktivado, la vivo mem, kaj ĝi idealigas, purigas, ĉion en la homa socio kaj plie evoluigas la individuon, hejmon, landon kaj la tutan mondon, pro kio la mondo paciĝos. La religio ja estas la forto prosperigi ĉion. Do, por la homo aliĝi al religio neniam signifas eskapi el la vivdaŭro sed tute male ricevi pli da aktiveco kaj evoluigo.

### ***3. Ĉu la religio, kiu celas kuracadon kaj mongajnon, ne povas nomi sin religio?***

Estas multaj religioj kiuj prosperas per kuracado de malsanoj kaj tiusimilaj organizoj kiuj per allogaj sloganoj de mongajno kaj, utiligante homan ĉagrenon, kredantigas multajn homojn. Estas pli multaj, ol kiom oni supozas, tiaj religisimilaj organizoj kun celo nur por mongajno kaj perdigas al la homoj ĝustan vojon. Sed, ni ne povas aserti ke la resanigo kaj mongajno tute ne koncernas la religion. Ĉar la religio estas origina forto de la feliĉo kiun ĝi alportas al la homoj. Estas tute nature ke post la aliĝo al religio ili ĉiam kun ĝojo kaj kuraĝo pasigas la vivadon, kaj tial povos okazi, kiel konsekvence, ke la resaniĝo povas esti la kaŭzo de la aliĝo al la religio kaj la aliĝintoj gajnos pli da konfido de la aliaj, kio ebligus al tiu gajni monon.

Sed tamen tio okazis kiel nur natura konkludo. Ni povas diri ke la religioj, kvankam ĝi nomas sin religio, kiuj celas nur resanigon kaj mongajnon, estas malaltrangaj religioj. La religioj donas la lumon al la homa vivdaŭro kaj celas la mondpacon, surbaze de siaj esencaj misioj, donas al la homoj belan koron bonvenigitan de Dio. Kaj per siaj instruoj la religioj devas gvidi kiel la politiko, ekonomio, kulturo kaj eduko. Kaj ili devas kontribui por vaste ĉielregni la surteran mondon. Ni devas scii: kvankam estas multaj religioj, tamen ili multe malsamas en siaj enhavoj. Do, ni devas kun prudento aliĝi al la vera religio.

#### **4. Pro homa malforteco naskiĝis la religioj. Ĉu ne?**

La esencaj principoj de religioj estas kredi kaj adori Ekzistantan Superan Iun, kiel Dion aŭ Budhon. Kvankam iuj diras ke la malforteco de la homoj sin turnas al religioj, pli ĝuste dirite, estas ne pro menciita kaŭzo sed denaska natura karaktero (inklino al religio) de la homo.

Kiam al la homoj la vivo estas minacita de krizo de la vivo, ĉiuj sin turnas kaj sin apogas al Ekzistanta Iu Supera. Kaj kiam la homo vidas la belecon de granda naturo, li sentas sian koron kvazaŭ refreŝigita, tio estas ankaŭ ia korinklino al religio. La religio ekestiĝis per si mem, postulate de la homeco. Kaj ne pro la malforteco de apartaj homoj naskiĝis la religio, sed ni povas diri ke la religio naskiĝis, ĉar la homeco de ĉiuj homoj postulis ĝin.

#### **5. Kian profiton oni povos ricevi post la aliĝo al Oomoto?**

Ni opinias ke ne estas rekomendinde oomotaniĝi nur por profito, sed tia demando povus esti prava de la vidpunktoj de la triapersonoj. Post la oomotaniĝo nur tiu homo per sia propra travivado kun Oomoto-kredo povos percepti “kio estas la profito.” Ni tamen prezentas laŭvice kelkajn ekzemplojn kiuj povus esti utilaj por via antaŭkono.

1. Oni povas fari preĝon al la Kreinto de ĉio en la universo kaj povas labori rekte por Dia laboro kiel manoj kaj piedoj de Dio. Dia laboro signifas reordigi la nuntempan malordigitan mondon kaj savlaborojn por ĉio, ne nur por ĉiuj homoj en la mondo sed ankaŭ ĉiuj bestoj kaj plantaĵoj.

2. La instruoj de Oomoto ampleksas en ĉio pri [la materia mondo] (perokule videbla) kaj [la spirita mondo] (perokule nevidebla, anima), interrilatoj inter Dio kaj la homo, inter Dio kaj ĉiuj estaĵoj, koncerne de ĉio, kio ja estas vaste, profunde kaj detale instruata. Pro tio ni povas percepti ĉion de la prudenta rigardo kaj fari ĝustan decidon. Kaj ni

povas havi senŝanceliĝan ŝtalan volon kaj la absolutan trankvilecon, apogante ĉion al Dio.

3. Oomoto montras evidente la bildon de la ideala mondo. Sekve ni povas havi klaran konvinkiĝon pri la celo de la vivdaŭro por kio la homo vivas.

4. Oomoto precize instruas laŭprocezan altiĝon de homa spirito (animo) kaj laŭ la strebado oni povas supreniri en pli altan gradon.

5. Koro kaj korpo ambaŭ fariĝas sanaj, la hejmon regas paco. Prosperas entrepreno. Pli grandiĝas la socia konfido kaj ni pozitive volontule servolaboras por la publiko. Tiel do, sinsekve ni povas ricevi, per si mem, bonan reputacion, socian postenon, longan vivon kaj ekonomian riĉon.

6. La homo vivas ne nur en fizika mondo sed ankaŭ postvivas post la morto en ĉielregno (kie veraj dioj kaj ĉieluloj loĝas kaj ĉiuj estaĵoj vivplene prosperas en pura, varma kaj luma mondo). Kaj li poreterne kiel ĉielulo povas servlabori en Dia laboro, kiu progresigas, evoluigas kaj plialtigas ĉion.

Sed por tio, kompreneble, jam ne necesas diri ke ĉiu homo devas strebi, preĝante kaj observante instruojn de Dio.

## ***6. Kio estas Dio? Ĉu ĝi estas elpenaĵo de homo, per kiu la homo konsolas sin mem?***

Dio ne estas materialo same kiel nia koro. Ĝi ne estas videbla per homaj okuloj, nek tuŝebla per homaj manoj. Tial povus okazi ke la homo pensas ke Dio estas homa elpenaĵo al kiu li sentigas dankemon nur por sin mem konsoli. Kvankam tiel nomataj koro kaj vivo estas ankaŭ nek videblaj nek tuŝeblaj, tamen ni povas percepti ke ili certe ekzistas. Kiel ekzemple, amo, intelekto, volo (voli ion) ne estas videblaj, sed neniu povas nei ilian ekziston.

Ĉi tia ne-materia ekzisto estas nomata vastasence spirito, spiritaĵo, kiu restas en ĉio ekzistanta en la universo. Kaj la vivforton de

ne-videbla funkcio, la originon de ĉio, ni nomas Dio, kaj ties spiriton ricevas la tuta kosmo (ĉiuj astroj, la terglobo, sur kiu ekzistas ĉiuj montoj, maroj, riveroj, homoj, bestoj, plantaĵoj kaj eĉ mineraloj).

Samtempe, la tuta estaĵo en la universo estas la manifestiĝo de la vivforto, kiu estas rigardata kiel la peceto de Dio. La funkcio de volo kaj intelekto tute ne estas produktaĵo, kiun la homo mem faris, sed ilin oni posedas denaske. Tiel same, la origina fonto de la universo tute ne estas produktaĵo de la homo mem, kaj tio neniam estas tiel malgranda ekzisto, per kiu la homo sin konsolas.

## ***7. Se Dio ekzistas, kial Li ne montras sian ekziston al ni?***

Iuj urĝe diras : "Se Dio ekzistas, kial Li ne montras sian ekziston en facile konvinka maniero? Se Dio estas ĉiopova, kial Li ne montras sin per sia frapo al nia kapo aŭ tirante nian orelon?" Ili asertus prave. Ilia urĝeco venas de la fakto ke ili ne povas senti Dion.

Dio estas nevidebla ekzisto, tial ni ne povas vidi Lin rekte. Sed kiam ni trarigardas ĉirkaŭaĵon kun kvietita koro, ni trovas la prezentiĝon de Dio. Ekzemple, la moviĝo de nuboj aŭ belaj floroj estas manifestiĝo de Dia koro. Ĉio en la granda universo ja estas aktivado kaj figuro de Dio.

Bedaŭrinde, tiuj estas malmultaj, kiuj sentas Dion, kvankam ni ĉiuj estas permesataj vivi en la sino de Dio. Ni ne povas vidi homojn aŭ aferojn en la mallumo, tamen sub la luma elektra lampo ni povas vidi ilin klare. La lumo de Dio estas kvazaŭ la elektra lampo. Ĝi ĉiam brilas lume. Ĉu vi ne pensas, ke preskaŭ ĉiuj homoj plendas, "kie ekzistas Dio?", vidante alian direkton kaj ne vidante la lumon?

Ni devas peni kvietigi, purigi kaj plibonigi nian koron. Ni povas posedi sperton reale senti la ekziston de Dio, konkrete dirite, vizitante sanktajn lokojn en Ajabe kaj Kameoka kun Dia atmosfero, legante sanktajn, revelaciajn librojn de Oomoto aŭ turnante sian koron al Dio

per plurfojaj recitadoj de preĝvortoj.

### **8. *Kia estas Dio laŭ la instruo de Oomoto?***

La difino de Dio en Oomoto estas: Dio estas ekzisto, kiu kreis la universon, nutras kaj gvidas homaron. Kiam ni rigardas floron en la ĝardeno kun atento, ni povas kompreni Dion. Kiu ja kreis ĉi tiun floron kun belaj koloroj kaj odoro? Se semoj semataj en la sama tero diferencas, ekfloras floroj diverskoloraj tie. Kiu faras tion? Flor-prizorganto nur prizorgas florojn.

Oni diras: aferoj iras glate kaj nature. Kion la vorto "nature" signifas? Ĉiuokaze, ni ne povas ne kredi naturan grandan ekziston. Ni nomas forton naturan kaj originalan "Dio".

### **9. *Kia estas Dio kiun Oomoto kultas?***

En Oomoto, ni adoras Dion, la Kreinton de la universo kaj diversajn justajn diojn. Dio, la Kreinto de la universo, estas eterna, absoluta, reale ekzistanta Dio. En "Kojiki", kroniko pri malnovaj okazaĵoj, ĉi tiu Dio estas nomata "DIO AMENO MINAKANUŜI". En Oomoto, ĉi tiu Dio estas nomata, "Oomoto- sume- oomikami". Diversaj religioj en la mondo nomas la Mastran Dion "Javeo", "Ĉielo" aŭ "Bramo".

En Oomoto, ni kultas ne nur la Mastran Dion, sed ankaŭ anĝelojn fidelajn laŭ la ordono de la Mastra Dio. Animoj de prapatroj de ĉiuj familioj ankaŭ estas bone kultataj.

### **10. *En kia maniero ni povas kredi la ekziston de Dio?***

Dio estas spirita ekzisto, tial ni ne povas vidi per niaj okuloj. Sed ni povas senti Dion. Ekzemple, ni povas iel senti kiel nia najbaro pensas, se ni tenas trankvilan koron en nia ĉiutaga vivo. Same kiel tio, ni nepre povas senti la ekziston de Dio se ni arde sopiras al Dio.

Ĉar Dio estas absoluta ekzisto, ni ne povas kredi Dion eĉ se ni penadas analizi per nia relativa homa saĝo. La teorio aŭ esplorado nur kondukas nin al abstrakta ideo, ne al firma Dikredo. Ni povas kredi Dion nur tiam firme, kiam ni penadas senti Dion per nia tuta korpo. Ĉar la arda koro estas kunligita kun Dio per transcenda forto.

Dio ne estas maŝino nek malvarma leĝo, sed estas ekzisto kun varma, vivanta, profunda amo. Kiam ni serioze preĝas, Dio donas al ni motivojn senti Dion. Por kredi Dion profunde, restas nenia rimedo krom preĝi al Dio kaj akumuli spertojn. Tamen, profunda Dikredo neniam koincidas kun perfekta kompreniĝo de grandioza Dio.

### ***11. Kial ni ne deziras preĝi al Dio?***

Se ni ne havas koron sopiri al Dio, ni ne havas deziron preĝi al Dio. Ju pli arda estas la sopiro al Dio, des pli forta estas deziro preĝi al Dio. Tial ju pli malarda sopiro al Dio, des pli malforta deziro preĝi al Dio. Antaŭ ĉio, kutimo de kulto mem estas grava. Kulto estas fundamento de Dikredo kaj la vojo kondukas al Dio. Eĉ se la kulto en la komenco estas farita formale, la preĝo fariĝos iom post iom arda preĝo. Ĉar ni kun sopiro al Dio povas komunikiĝi kun Dio.

Iuj hontas pri preĝo. Preĝo estas ne nur peto al Dio sed ankaŭ estas la vojo al senlima progreso, harmoniiĝo kun Dio kaj kompreniĝo de senlima Dia koro. Do bonvole komencu je preĝo.

### ***12. Kion preĝi al Dio?***

Ĝenerale, oni emas preĝi al Dio kun petego ke ili gajnu profiton en komercado aŭ Dio favoru ilin. Tia preĝo estas egoisma preĝo aŭ postulo kaj ĝi ne estas justa preĝo.

Justa preĝo estas peti Dian protekton konfidante ĉion al Dio, "Bonvolu gvidi kaj protekti min laŭ via volo." Samtempe grava estas penado kaj praktiko por plibonigi sin mem. Serioza penado certe

alportos al vi Dian protekton.

Estas bone ke vi preĝu por vi mem sed ne forgesu ke vi preĝu por mondspaco aŭ feliĉo de homaro.

Ĉu ni ne preĝu serioze ke Dio donu trankvilon, feliĉon al ĉiu homo sur la tero kaj mondspacon? Kaj ni agadu por la realiĝo de spaco per preĝo en nia ĉiutaga vivo.

Fondintino DEGUĈI Nao surverŝis akvon sur sin por purigado eĉ nokte en severa vintro. Spite de la granda aĝo, ŝi faris purigadon dekojn da fojoj en unu nokto. Ŝi petis pardonon de Dio pri peko, malpuro kaj impertinento en la mondo anstataŭ homaro. Ŝi preĝadis Dion ke granda malfeliĉo fariĝu eta malfeliĉo, eta malfeliĉo fariĝu nenia. Ĉu ni preĝu por mondspaco kaj feliĉo de homaro kun vasta koro?

### **13. Ĉu homo kun bona konduto bezonas havi Dikredon?**

En la mondo troviĝas multaj justaĵoj kaj bonaĵoj. Sed nenio estas pli justa ol sekvi Dion kiu kreis ĉi tiun mondon kun humila koro.

Eĉ se unu peco da dentorado en la horloĝo turniĝas per la tuta forto, ĝi per si mem ne kontribuas al la horloĝo. Ĉar turniĝado de dentorado harmoniiga kun aliaj aparatoj por atingi tutan celon estas justa laboro en la horloĝo. La samo estas dirita pri homa afero. Eĉ se ni agas kun la konvinko ke ni iras la justan vojon, ĉu nia vojo estas vere justa aŭ ne estas super homa kompreno.

La mondo de Dikredo havas sian propran instruon montritan de Dio kaj ĝi montras al ni la vojon sur kiu ni devas iri. La vojo kondukas nin en la sekura, justa kaj korekta direkto.

Eĉ se vi pensas ke vi kondutas bone, estas malfacile fari agadon kiu harmonias Dian koron. Por fari tion, vi unue faru sinceran penadon kiel homo. La penado gvidos vin al Dikredo aŭ preĝo al Dio. Se vi deziras konduti bone elkore, bonvole lernu la veran servon al Dio kaj iru universalan kaj eternan Dian vojon.



## **14. Per kia kriterio ni elektu religion?**

La plej grava afero en la elekto de religio estas ĉu oni povas havi fortan simpatian en sia animo al la religio. Sed ni devas esti atentemaj al la enhavo de religio. Ĉar iuj religioj apartenas al malalte-nivela superstiĉo kaj aliaj adoras malalte-nivelan spiriton kiel animala-spiriton.

Ni rekomendas al vi ekzameni jenajn 3 punktojn pri la religio.

1. Ĉu ĝi adoras la Kreinton de la universo?
2. Ĉu ĝi havas profundan instruon kun aŭtoritato kaj ĝi promesas al vi senliman progreson?
3. Ĉu ĝi havas eminentajn gvidantojn (fondinto, gvidanto, misiistoj)?

Kompreneble aliaj elementoj ankaŭ estas gravaj. Temas pri Oomoto: Ĝi havas eksterordinare eminentajn aferojn pri la 3 punktoj kompare kun aliaj religioj. Plie, Dia protekto estas abunda kaj plenplena de Divirtoj. Oomoto aperis por savi la tutan mondon. Tial se vi fariĝas Oomotano, vi povas partopreni en Dia granda entrepreno kiel fidela servanto.

## **15. Malgraŭ tio, ke mi kredas, kial malfeliĉo venas al mi?**

En la komenco de religia vivo, oni emas pensi, ke nur feliĉo venas, sed la realo iras ne ĉiam tiel. Oni fojfoje renkontas jen malsaniĝon jen malfeliĉan katastrofon.

En nia ĉiutaga vivo multaj estas homaj agadoj neraciaj aŭ eraraj, kaj ankaŭ aferoj komplike rilataj al malamo kaj malpaco inter homoj. Pri tiuj ĉi oni povas diri, ke homoj inter si aŭ ili mem kreas semon de malfeliĉo, ĉu ne?

Pri tiu ĉi problemo respondecas homo. Dio estas estaĵo de nur amo, nur bono. Dio neniam malamas aŭ punas iun ajn. Dio ŝanĝas malbonan rezulton memfaritan de homoj kiel eble plej malgranda.

Okazigo de malfeliĉo neniam venas de Dio aŭ de kredado.

Se oni pasigas vivojn kun ĝustigitaj koro kaj aktiveco, malmultiĝas tiaj malfeliĉoj. Havi la koron kredeman portas eblecon tiel pensi eĉ ĉe renkonto de malfeliĉo, “Mi povus renkonti pli grandan malfeliĉon, sed dank’al Dio granda malfeliĉo estis malgrandigita!”, kaj ni povas male senti dankemon al Dio. Ju pli multe ni konscias la celon de naskiĝo al tiu ĉi mondo, des pli bone ni povas ne venkite de malfeliĉoj pasigi ĉiutagan vivon kiel helan kaj aktivan.

### **16. Iuj religioj ofte mencias destinon, nome, kio estas tio?**

Kie okazas io, tie nepre estas ia kaŭzo. Oni nomas tiun kaŭza destino.

En la mondo hodiaŭa oni povas foje trovi la staton tia, ke bona ago ricevas neniom da rekompenco, aŭ ke estas ne punate fari malbonaĵon kaj daŭre ĝin kaŝi. Sed Dio en ĉiuj okazoj vidscias ĉion. Eĉ se iu ne estas leĝe punata, la rekompenco por malbonfaraĵo revenas al tiu aganto kun iu aliforma puno. Se iu daŭre faras bonajn agojn, nepre tiu ricevas favoron de Dio kaj feliĉiĝas.

Dio vidas ĉion juste. Kiam oni faras bonajn agojn, tiam nepre pli da bono sekvas. Kiam oni faras malbonajn agojn, tiam malbono aliforme revenas al tiu aganto. Tio estas nur sekvo de la kaŭzo, ne de tio, ke Dio punas, sed de tio, kion oni faris.

### **17. Ĉu malsano resaniĝas per kredado?**

Malsano havas kelkajn kaŭzojn. Malgraŭ tio, ke vi kredas Dion, se vi faras senritman vivadon aŭ prenas ion venenan al via korpo, vi ne povas eviti malsaniĝon. Se okazas tiel malsaniĝi, vi pardonpetu Dion pri via pasinta vivmaniero, kaj samtempe gravas, ke vi ricevu Dian favoron pere de kuracistoj kaj medikamentoj, kiuj nepre necesas por resaniĝo en la reala mondo; nur preĝi al Dio aŭ ricevi nur “Miteŝiro

Otoricugi”, la resaniga petpreĝado de Oomoto, kun neniom da ordinara kuracado portas rezulton tiel, ke resaniĝiva malsano estas neniam resaniĝiva. Tamen gravas, ke oni preĝu al Dio por pli bone ricevi Dian favoron pere de kuracistoj kaj medikamentoj.

Aliflanke, mensa malfortiĝo multfoje kaŭzas malsaniĝon. Se okazas tiel, vi pli ol kutime preĝu al Dio, kaj vi koncentriĝu je kredado. Pere de tiuj agoj via animo plifortiĝas, ĝistiam malhela koro fariĝas pli kaj pli hela, kaj ankaŭ via korpo pli kaj pli resaniĝas. Kaj, se vi suferas pro mensa malsano, mi rekomendas ke vi preĝu por Difavoro, farante “Gokigan”, la preĝon fare de peranto, aŭ “Miteŝiro Otoricugi”, kaj samtempe konsultiĝu kun psikopatologia kuracisto kaj ricevu lian kuracadon.

***18. Estas iu religio, kiu diras, “Kuracisto kaj medikamento estu for, por vi sufiĉas nur preĝo.” Kion Oomoto pensas pri tio?***

Ĉar homo havas korpon, foje okazas malsano. Kiam oni malsaniĝas, tiam oni devas fidi kuraciston kaj medikamenton. Por tio, en tiu ĉi mondo, Dio permesas estadon de kuracistoj kaj medicino. Sed ne estas komplete nur porti vian korpon al kuracisto en la okazo de malsaniĝo. Antaŭ ĉio gravas, ke vi preĝu turnante vian koron al Dio kaj elkore petu Dian helpon.

En la instruoj de Oomoto estas utao jena:

Eĉ se preĝas vi  
Malsaniĝinte en lit’  
dion respondan  
vi ne forgesu nepre  
kuraciston realmondan.

La utao instruas nin, ke samtempe necesas ambaŭ sincera preĝo al Dio kaj uzo de kuracisto kaj medikamento. Estas religioj, kiuj ekskludas ĉiajn rimedojn kiel eĉ medikamenton kun devianta kredo. Kaj estas homoj, kiuj fidis nur kuraciston, nur medikamenton kaj forgesas

fidon al Dio, la origino de vivo. Ĉi tiuj ambaŭ estas malbonaj.

### **19. Religia vivo. Kia vivo ĝi estas?**

Se temas pri religia vivo, oni povas havi impreson, ke ĝi estas vivo tia, malsimila al tiu de la ordinaraj homoj, sed reale ĝi ne estas tiel neordinara vivo. Ĝi estas tia, ke oni tagon post tago preĝas al Dio kaj vivas laŭ la koro de Dio. Diri tiel estas facile, sed agi tiel povas esti plej malfacile.

Kredi kaj preĝi Dion estas origino de religia vivo. Oni devas komenci la vivon ekde ĉi tio. Samtempe estas grave, ke legante la sanktajn librojn vi konu instruojn de Dio. Farante tiel oni rimarkas gravecon, kiun montras la preĝvortoj kaj la sanktaj libroj. Kaj ekfonti ĝas la koro tia, ke ĉiutaga vivo pli konforma al la instruo estu ŝanĝita. Konkrete realigi la korvolon povas fari ĉiutagan vivon kontentiga al Dia koro, kaj vi paŝon post paŝo povas altniveligi en religia vivo.

Sperto estas bezonata al religia vivo. Se vi agas kun sincera preĝo, vi nepre ricevos Dian protekton kaj vi povas gajni religian sperton. Kaj la sperto povas igi vin kompreni ĝis la fundo de via korpo amon de Dio kaj grandecon de Dia forto.

Religia vivo estas tio, ke oni ĉiutage preĝas al Dio, kaj oni lernas la instruojn, kiujn oni aplike devas praktiki en ĉiutagaj vivoj.

### **20. Kio estas la plej grava en religia vivo?**

En la lasta rubriko mi respondis, ke religia vivo estas la vivo tia, ke oni preĝas al Dio kaj oni praktikas la instruojn de Dio. Oferado de dankemo kaj preĝo al Dio kaj praktikado de Dia instruo estas kvazaŭ ambaŭ radoj de ĉaro. La plej grava el ili estas serioza preĝo al vera Dio.

En la instruoj de Oomoto montriĝas jene, “Nenia trezoro estas pli valora ol preĝo.” Preĝo estas granda origino de religia vivo. Tie mankas preĝo, kie mankas vera protekto de Dio, neniam ekaperas la vero. Se vi preĝas,

vian koron lumas la lumo, kaj viaj imagoj pri aferoj pli klariĝas. Vi ekpovas vidi la vojon, kiun vi devas iri. Eĉ pli, elaperas deziro marŝi pli antaŭen, ekaperas la forto toleri kontraŭ malfacilaĵo kaj transpasi ĝin. Ankaŭ la koro retrospekta plifortiĝas, kaj en vi ardas deziro al senlima plibonigo.

Preĝo estas fonto de ĉiuj vivofortoj. Se unufoje vi enpaŝas la vojon de religia vivo, estas grave, ke vi praktiku preĝojn en ĉiu mateno kaj vespero. Al mi ŝajnas, ke vi en tiuj preĝoj povas mem senti valorecon de preĝado.

## **21. Kio ja estas iluminiĝo?**

En religioj oni ofte diras pri iluminiĝo. Ĝi estas religia termino, uzata nun vaste ĝenerale, sed origine de Budhismo.

Ni en ĉiuj tagoj vivas rilate al diversaj aferoj; kutimo, mono, honoro, rango kaj ideo, ktp. Kaj ni vivas regate de tiuj aferoj. Eĉ se iu ĉiam diras, “Mi pensas kaj agas sendepende de io,” kiam iu afero volvas tiun homon ĉirkaŭ ties profito, tiam tiu obsedite de la afero fariĝas obstina kaj fine ne povas konstati la veron kun aplombo kaj pli vasta vido. Esti regata de io malhelpas scii la veron kaj kaŭzas unu staton de eraro.

Nirvano ja estas tio, ke onia nedecidemo en sia koro solviĝas kaj oni ekkonvinkiĝas pri la vero.

Se vi, dank'al religia vivo, akumulas trejnojn por ne esti regata de iu ajn afero kun altigo kaj vastigo de mema konscia movo, vi povas tuŝi profundan veron kaj esti trankvila. Ĉio, kion vi vidas, ŝajnas brilanta, kaj al vi estas promesate pasigi vian vivon, kiu estas senlime bela.

## **22. Se homo mortas, ĉu ĉio per la morto finiĝas?**

Ŝajnas ke multaj homoj havas tian penson: “Se homo mortas, ĉio per la morto finiĝas; nenio restas. Pro tio, dum mia vivo mi malprofitos,

se mi ne faras kontentige plaĉajn aferojn.” Tio estas tute erara.

Homa animo, eĉ se ĝi malaperas de tiu ĉi mondo, ĝi daŭre ekzistas en la spirita mondo tenante dumvivajn karakterizon kaj konscion. La morto estas ĉeso de funkcio de fizika korpo.

Ĉar homa korpo estas materia, ĝi, laŭ la leĝo de la naturo, devas kadukiĝi, putriĝi kaj perdiĝi. Male, la animo eterne ne perdiĝas, ĝi neniam mortas nek maljuniĝas. Homa animo jam ekzistas antaŭ ol ĝia naskiĝo kun korpo. Dum vivado en la reala mondo ĝi loĝas en la korpo. Kaj ĉe la alveno de morto la animo eliĝas el la korpo, kaj ĝi revenas al la spirita mondo.

Se vi kun la penso, ke ĉio finiĝas ĉe la morto, vivas senlime laŭplaĉe, dume, vian animon vi ne povas eviti de vundigo, malfortigo kaj malpurigo. Kaj, ĉar la animo eterne daŭras post reveno al la spirita mondo, ĝi devas ŝuldi la kulpon kaj suferi por ĉiam.

### ***23. Ĉe Oomoto, kion oni pensas pri la vivocelo?***

En la instruoj de Oomoto estas jeno:

La vera vivcel'  
kio estas? Mi respondu,  
sur tiu ĉi ter'  
formi la mondon Dian  
ja neniam rompeblan.

Nome, ni estas gvidataj tiel, ke la celo de homa vivo estas konstrui sur tiu ĉi tero pacan mondon plenan de eterne daŭranta feliĉo kaj prospero laŭ la volo de Dio, la kreinto de tiu ĉi mondo.

Homoj havas siajn animojn partigitaj donitajn de Dio en siaj propraj korpoj. Kaj, nur kiam Dio kaj homo en realo pace harmonias, tiam ekestas vera aktivado dezirata al homo. Kiam iu fanfaronas, “Mi estas tiom digna kiom ne necesas Dio aŭ Budho,” se tiu ne havas rilaton al Dio kaj tiu ne povas ricevi gvidon (protekton) de Dio, tiu neniel povas fari efektivan laboron konfiditan de Dio al homaro.

La vera celo de homa vivo estas tio, ke vi havu koron similan kiel tiun de Dio la kreinto, kaj vi konstruu la idealan mondon, fariĝinte kvazaŭ la mano kaj la piedo de Dio.

## ***24. Ĉe Oomoto, ĉu homo estas rigardata kiel filo de peko?***

Ŝajne estas tia religio, kiu rigardas homon kiel filon de peko laŭ ties kompreno pri homa naturo. Estas ne tiel instruata ĉe Oomoto. Male, ĉe Oomoto difiniĝas tiel, ke homo, kiu estis kreita de Dio, havas la korpon kaj animon ambaŭ partigitajn de Dio.

La homoj estas gefiloj de Dio kaj Dia popolo senrilate de diferenco de gentoj aŭ rasoj. Homo havas unu flankon, ke li per memprogreso povas fariĝi dio, kaj li samtempe havas alian flankon, ke li estas tentita kaj degenerigita de diversaj pekoaferoj de tiu ĉi mondo kaj li pli kaj pli kontraŭstaras Dion; rezulte de tio, liaj animo kaj korpo fariĝis esti regataj de diabloj. Dio kompatas multajn homojn, kiuj mem degeneris, por tio, ke la animojn purigu kaj revivigu kiel tiajn de Dia filo, kaj Dio malfermis la vojon al instruoj de Oomoto.

Pri sankteco de homa naturo Oomoto klarigas jene:

Animo homa,  
partigita de Dio,  
la plej supera  
devas ekde komenco  
esti laŭdinde bela!

Ĉar korpo via,  
animo via apartenas  
al Dio sankta,  
vi adore respektu  
vian korpon kaj vin mem.

## **25. Kiel Oomoto rigardas aliajn religiojn?**

Ĉiuj religioj instruas pri la amo kaj bono de Dio (Budho). Tial, Oomoto tute ne akuzas aliajn religiojn falsaj. Oomoto instruas ke ĉiuj religioj devenas de sama fonto, de unu sola Dio kiu kreis la tutan universon; tio signifas ke ĉiuj religioj adoras la saman Dion.

En la mondo ekzistas diversaj religioj, kiuj diferencas laŭ la moroj, kutimoj, naciecoj kaj tempoj en kiuj ili fondiĝis. Sed eĉ se diferencas la nomoj de Dio, ritformoj kaj doktrinoj, ili havas komunan celon efektiviĝi al la homaro pacon kaj feliĉon.

Ĉiu religio devas forĵeti siajn antaŭjuĝojn, kaj ĉesi kalumnii aliajn, ke tiuj ĉi estas falsaj. Kaj ili kunlaboru mano en mano, manifestante siajn komunajn misiojn por purigi kaj evoluigi la socion de la homaro.

Sed, lastatempe aperis “falsaj religioj” kiuj nomas sin religioj kaj okazigas tumultojn en la mondo. Ili tute ne estas veraj sed naskitaj de malicaj koroj.

## **26. Kiel Oomoto gvidas homojn?**

Al la homaro animo estas donita de Dio, kiu kreis ĉion en la universo kaj la homoj estas gefiloj de Dio kaj ankaŭ gefratoj unuj kun la aliaj.

Kunfondinto DEGUĈI Onisaburo versis jene :

Dio favoras la homaron  
per Sia parto-animo  
tial la homaro ja estas  
la gefiloj de Dio  
kaj la temploj de Dio.

Nature la homa animo estas tiel pura kaj bela same kiel tiu de Dio. Sed nuntempe, malvastaj egoismaj ideoj profunde radikiĝis



en homajn korojn. Pro tio la homoj makulis, malpurigis sian puran animon donitan de Dio, ili ne povas rekonu la ekziston de sia Kreinto mem. Oomoto celas ke homoj repurigu sian animon pura.

La homo kun pura animo havas veran kuraĝon, saĝon, amon kaj amikecon, kaj tiuj aperas en siaj vortoj kaj agoj. Antaŭ ĉio gravas ke ni rekonu nian belan animon donitan de Dio kaj en ĉiutaga laboro ĉiu el ni ĝuste praktiku sian virton, pozitive plenumu ĉiujn aferojn.

## ***27. En la mondo oni diras ke okazas puno de Dio. Kion opinias Oomoto pri tio?***

Dio estas la fonto de amo, kaj Li estas amo kaj bono mem. Dio savas kiun ajn eĉ homon kun granda peko. Dio estas absolute plena, Li neniam forlasas eĉ unu pekulon. Homo punas pekulon, kaj laŭdas bonulon. Tia ago venas el homa malvasta koro, kiu ja senkompare diferencas de senlima amo de Dio.

Dia koro estas tia ke Li volas senfine ami kaj senĉese savi. Se Dio tenus abomenon eĉ iometan, Li jam ne plu estus Dio. Oomoto ne predikas ke Dio punas. En la mondo diversaj malfeliĉoj kaj katastrofoj okazas kaj ili ŝajnas kvazaŭ punoj, tamen nenio venas de Dio. Tiuj estas la rezultoj de malklereco, malico kaj destinoj de homoj. Malakordiĝo de homaj sentoj rezultigas malbonajn konkludojn, kaj iliaj inferaj sentoj faris malfeliĉon.

Dio penas demeti malklerecon kaj malicon kiuj estas la kaŭzoj de malfeliĉo kaj katastrofo, kaj Dio penas instrui homojn por ke oni vivu ĝoje kaj sincere.

## ***28. Kion oni instruas en Oomoto?***

En la Sankta Skribo de Oomoto ni legas jenajn vortojn de la Prapatra Dio:

“Vizitu Oomoton en Ajabe kaj aŭskultu Dian instruon. Mi favoros

vin per Diforto travidi ĉion en la mondo per nur unu rigardo”, tiel la Fondintino DEGUĈI Nao, la Kunfondinto DEGUĈI Onisaburo, kaj Spiritaj Gvidantinoj kaj Kungvidanto elmontras abundajn instruojn. Ĝi ampleksas la priskribojn pri diaj aktivadoj de la komenco de la universo ĝis nuntempo, kaj ŝanĝiĝoj de la universo, kaj menciindaj trajtoj de la hodiaŭa mondo, ideala mondo en estonto, kaj krome, la aktivado de savdioj de la praepoko ĝis moderna, kaj pri interrilatoj inter Dio kaj homoj, ktp.

Plue, la instruoj de Oomoto temas pri la konsisto de la spirita mondo, postmorta vivo, la vera vivcelo, ĉiutaga vivmaniero individua, kaj ĉiu fako de la homa aktivado: politiko, ekonomio, arto, religio, edukado, ktp. Ĝi klarigas ĉiujn aferojn en la universo tre detale. Ni povas diri ke por la unua fojo la sekreto de la universo estis malkovrita.

La instruoj de Oomoto klarigas komplete kaj profunde la veran staton de tiu ĉi mondo kion neniu el la sanktuloj aŭ filozofoj povis klarigi.

## ***29. Kiel Oomoto rigardas hodiaŭan malordan socion?***

De la jaro 1892, kiam fondiĝis Oomoto, la Sankta Skribo de Oomoto, revelaciita al la Fondintino, avertis ke en la mondo okazos tia kaoso, kiun ni vidas hodiaŭ.

En la Sankta Skribo ni legas jenajn vortojn: ĉio en la mondo estis malĝusta, ignorante Dian Providencon, deviinta al homa egoismo; Dio anstataŭigos ĉion radikale per justa principo, kaj la mondo estos rekonstruita tiel pura kaj bela kiel kristalo. Por purigi la mondon, okazos granda ŝanĝo kaj kataklismo individue, mondscale, en spirita fako kaj fizika.

Nuntempe, kiel la Sankta Skribo de Oomoto avertis, konfuzaĵoj kaj drastaj ŝanĝiĝoj okazas en la mondo, ne nur bonaĵoj sed ankaŭ diversaj tragikaj malbonaĵoj; ĉio ĉi estas la doloro de akuŝo por rekonstrui la novan mondon pli bonan. Al la Dio, kiu plenumadas Sanktan

Laboron grandskale rekonstrui la mondon, ni preĝas ke la grava malfeliĉo estu en malpli grava formo, kaj la malpli grava: preskaŭ nerimarkebla, kaj ni kondutas fidele observante la instruojn de Dio.

### ***30. Kiel Oomoto rigardas hodiaŭan socion, en kiu ekzistas diferenco inter riĉulo kaj malriĉulo, kaj homaj klasoj?***

Laŭ la vidpunkto de feŭdisma epoko, ni povas diri ke tiuj diferencoj malgrandiĝis, tamen ili ankoraŭ restas. Laŭ Oomoto-vidpunkto ni devus aserti ke la diferenco inter riĉo kaj malriĉo devos esti malgrandigita en la ideala mondo, sed tio ne signifas ke la diferenco tute malaperos en la ideala mondo.

Ĉiuj herboj nature malsamas en sia kreskiĝo, kaj nature okazas la diferencoj, same inter homoj denaske okazas diferenco de saĝeco kaj diferenco de beleco, kio restas ekster homa povo. En Oomoto, se oni traktus egale homojn diligentan kaj maldiligentan, tio devas esti kondamnita.

De la komenco, en nia mondo ĉiuj estas kreitaj malsame en grandeco, boneco, ktp, tial nature ekzistas diverseco. Tamen, se la diferencoj estus faritaj nenature, ni ne akceptus ĝin. Homoj reciproke respektas, kaj oni okupiĝas pri la laboro taŭga laŭ sia kapablo, tiel ĉiuj homoj povos vivi kune kun ĝojo kaj kontento. Tiu societo estas nia idealo.

### ***31. Kiel Oomoto rigardas komunismon, socialismon kaj kapitalismon?***

Oomoto opinias ke komunismo, socialismo kaj kapitalismo, kies ideoj estis konstruitaj surbaze de materiismo, pereos kaj post tio nepre venos la mondo, kiun regos la principo de Diestrata vivo.

Diestrata vivo estas la principo de la socio kie homo altigas sian humanecon donitan de Dio kaj elmontras ĝin plene, kaj oni vere ĝuas

vivon kaj dankas al Dio, tie spontane aperos la ideala mondo. Tio ne estas la mondo konstruata en la kadro de homa doktrino. Kiam ĉiuj homoj praktikas sian humanecon donitan de Dio, bele kaj pure kun sia personeco, tiam nature konstruiĝos la mondo en akordo kun la Volo de Dio. Ni faras diversajn agadojn por ke ĉiu homo elmontrus sian humanecon trans doktrinoj.

### ***32. En kio Oomoto pensas ke kuŝas la kaŭzoj de milito kaj konflikto?***

En Oomoto ni opinias pri la kaŭzoj de militoj kaj konfliktoj, jene: tio multe dependas de homa intenco; nur se nia lando prosperas, kiaj ajn estu aliaj landoj, tia “egoisma sintenado” estas la kaŭzo de la milito.

Majstro DEGUĈI Onisaburo montras jenajn vortojn: “ni, temploj de Dio, devas klopodi forigi videblan kaj nevideblan, du grandajn barojn, el kiuj la plej granda videbla estas la armado (escepte de policarmado) kaj fermo de landlimoj. Kaj tiuj de plej grandaj nevideblaj estas nome malamikaj sentoj inter nacioj kaj rasoj kaj ankaŭ inter religioj”. (Rakontoj el la Spirita Mondo).

Kiel ni legas vortojn de la Majstro Onisaburo, ni povas aserti, ĝis la armado de la ŝtatoj estos abolitaj kaj malamikaj sentoj de homoj estos nuligitaj, la kaŭzo de milito neniam estos nuligita.

### ***33. Kiel en Oomoto oni pensas pri milito?***

En Oomoto la milito estas la plej malbona peko de la homaro; “Dio konsideras la vivon de unu homo pli valora ol la tero. En milito homoj rabas tiujn valorajn vivojn, kio estas la plej granda malbono”. Tiel milito estas kondamnita. En decembro de la jaro 1945, kiam Majstro DEGUĈI Onisaburo estis en la varma fonto Joŝioka en Tottori, lin intervjuis raportisto de la ĵurnalo Asahi, kaj ties raportaĵo aperis en la 30-a. Liaj vortoj altiris grandan intereson de mondo pro ĝia grava

enhavo, kiu indikis al ni la ĝustan vojon por la rekonstruado de Japanio, en la postmilita kaoso.

La resumon ni prezentu : “La japana popolo neniam pereos. Japanio estas nun tute senarmigita, tio entenas la sanktan mision kiel la pioniro de mondpaco. Vera mondpaco estos realigita nur kiam ĉiuj armeoj en la mondo estos abolitaj. Nun jam tiu tago alproksimiĝas.”

Surbaze de tiuj vortoj de la Majstro, post la milito Oomoto senĉese daŭrigas apelacion al la mondo koncerne de malarmado, kontraŭmilito, mondpaco tiel ke neniam plu okazu milito, kaj egoismo de la homaro estu anstataŭigita de homamo, nome frateco.

### **34. Kiel Oomoto antaŭdiras pri okazontaĵoj en estonteco?**

La Fondintino DEGUĈI Nao kaj Kunfondinto DEGUĈI Onisaburo, ambaŭ estis rimarkindaj profetoj. “Diaj Revelacioj” verkita de la Fondintino kaj “Rakontoj el la Spirita Mondo” diktita de Kunfondinto estas granda kvanto da Sanktaj Skriboj kaj ili ambaŭ estas la libroj de antaŭdiroj.

La profetaĵoj klare eksplikas pri la malkonstruo kaj rekonstruo de ĉi tiu senorda mondo al nova mondo per korektiĝo de homa koro kaj pri la transiĝo de la mondo de kiam Oomoto fondiĝis ĝis la kompletigo de la ideala mondo.

En “Diaj Revelacioj” Dio kun absoluta aŭtoritato asertas : “Sciu ke la vortoj de Dio realiĝos kun nenia eraro eĉ harlarĝo da diferenco. Se ne, Dio ne ekzistas en ĉi tiu mondo.” Fakte tiuj profetaĵoj vere efektiviĝis. Ni povas diri tiuj antaŭdiroj estas deklaroj. Por plua studo oni bonvolu sin turni al la Sankta Skribo de Oomoto “Diaj Revelacioj”.

### **35. Kion Oomoto konsideras kiel idealon?**

La idealo de Oomoto estas perfekte identa kun tiu de Dio. Ni esperas ke ĉio fariĝos paca kaj serena: ĉio en la reala mondo fariĝos same kiel

en ĉielula regno—ni devas purigi ĉion en la spirita mondo kaj forigi malpuran inferon.

La idealo de Dio estas ŝanĝi la materian mondon kaj spiritan mondon al ĉielula regno, kaj akordigi ĉiun kun senlimaj vero, bono, belo kaj amo de Dio. Tio estas la idealo de Oomoto kiu penas servi al Dio.

### ***36. Kian mondon Oomoto konsideras kiel la idealan?***

La devizo, “Unu Dio, unu mondo, unu interlingvo” simbolas la aspekton de ideala mondo.

“Unu Dio”: kvankam la nomo de Dio diferencas inter religioj kaj sektoj, tamen ĉiu estas la nomo de la sama Kreinto de la universo, la Plejalta Dio.

“Unu mondo”: unu granda familio de la homaro kaj starigo de tutmonda organizo de mon dofederacio.

“Unu internacia komuna lingvo”: ni adoptu Esperanton kiel oficialan internacian lingvon. Esperanto estas neŭtrala lingvo kiu apartenas al nenia nacio. Per Esperanto, en neŭtrala pozicio homoj povos senĝene interkomuniki.

Tiuj estas la aspektoj de la ideala mondo, kaj ni esperas ke la klimato en la mondo bonordiĝos, kaj katastrofoj kaj malsanoj malmultiĝos. En diversaj kampoj de politiko, ekonomio kaj scienco, internacia interfluo pli kaj pli pace vigliĝos.

Dume, ni esperas ke oni plialtigos sian religian sentimenton kaj aktivigos kulturen movadon por purigi sian animon. Per tiuj aktivadoj, homaro estimos naturajn riĉfontojn, kaj kun dankemo pligrandigos publikan bonon. Kaj ĉiu individuo praktikos sian originalecon kaj povos ĝoje okupiĝi je sia laboro. Tiamaniere spontane aperos la mondo, kie ĉiuj homoj kunprosperos kaj adoras Dion. Tia mondo estas nia idealo.

### **37. Kiamaniere Oomoto konstruos idealan mondon?**

Oomoto neniam intencas konstrui idealan mondon nur per homa forto. En la Sankta Skribo de Oomoto troviĝas jenaj vortoj: “Dia Plano de antaŭ Trimiljaroj.” La vorto “Trimiljaroj” ne signifas nur ties ciferan tempodaŭron sed tre longan tempon. De la pratempo Dio, antaŭvidante nuntempan konflikton, starigis tiun perfektan planon por mondosavo. Kaj la mondo sin movas laŭ la plano.

De la jaro 1892, la Prapatra Dio de la ĉielo kaj la tero Di-posedis la Fondintinon DEGUĈI Nao, kaj tra la Kunfondinto DEGUĈI Onisaburo kaj Spiritaj Gvidantinoj, Dio disvastigas la instruojn por savi la mondon, kaj plenumas Sian sanktan planon tra la mondo.

Unue, Dio konstruas la fonton de rekonstruo de la mondo, tra la mondoj spirita kaj materia. Sekve, Dio intencas disetendigi tiun originan modelon por iniciati la vojon al feliĉo kaj prospero de la homaro. Ni penas disetendi la idealon de Dio tra la tuta mondo kaj konstrui la idealan mondon kiu daŭros eterne, laŭ la gvido de Fondintoj kaj Spiritaj Gvidantinoj.

Por la realigo de la ideala mondo nepre necesas purigi la animon de ĉiu homarano. Sen tio ni tute ne povos plibonigi homan socion kaj feliĉigi nin mem. En Oomoto, ni oferas preĝon al Dio por reformo kaj altiĝo de ĉiu en la homaro, kaj daŭrigas nian aktivadon sub la gardo de Dio.

Samtempe, laŭ la instruo, “vera religio kapablas gvidi la edukadon, politikon, arton kaj ĉion alian,” Oomoto gvidas politikon, ekonomion kaj edukadon kaj en diversaj fakoj de la homaj aktivadoj kaj efektive praktikas la instruojn kaj aktive disvastigas ilin enlande kaj eksterlande. Tiel Oomoto donas grandan influon al ĉio en la mondo kaj akcelas la progreson de la homaro. Kaj tiel laŭ Dia Volo, Oomoto ludos gravan rolon kiel ĉefmotoro por konstrui la idealan mondon sur la tero.

### **38. Kiel Oomoto konsideras sciencan?**

De la malnovaj jaroj oni emis pensi ke scienco kaj kredo ne povas kunekzisti. Tio ne estas vero. Progreso de scienco ebligas pli profundan komprenon pri Dio. Tial oni devas studi sciencan, kaj progresigi ĝin. Sed tamen, estas tro da orgojlo se oni pensus ke scienco solvas ĉiujn problemojn. Oomoto admonas nin pro orgojlo ĉar tia orgojlo de studentoj de scienco estas unu el la kialoj de la malordo de la nuna mondo.

La penso kaj volo de Dio, la Kreinto de senlima makrokosmo, superas homan supraĵan intelekton kaj sciencan. Homo nur povas scii pri peceto de Dia volo pere de la aferoj en la natura mondo.

Tiel, scienco klarigas nur unu peceton de Dio. Homa saĝo ne estas akirebla nur el libroj, sed estas sorbebla el la naturo kaj ĉiutagaj spertoj kaj ili profundigas homan saĝon. Homo devas studi sciencan kun modesta koro dum la tuta vivo, kulturi pli vastan konsideron, konjekti Dian Koron profunde kaj kontribui al la feliĉo kaj prospero de homaro.

### **39. Kiujn librojn vi rekomendas al ni legi por detale sciiĝi pri Oomoto?**

Oomoto havas ampleksajn sanktajn librojn (sanktaj skriboj, instrulibro, kaj aliaj). Ekzemple, “Rakontoj el la Spirita Mondo,” skribita de Kunfondinto, havas 81 volumojn.

La legado de sanktaj libroj malsamas je la legado de ordinaraj ĵurnaloj kaj gazetoj. Ĉiuj vortoj kaj frazoj enhavas tre profundajn internajn signifojn— nutraĵo de koro. Tio malfaciligas la legadon de sanktaj libroj pli ol la legado de ĵurnaloj. Do, ni prezentas sanktajn librojn laŭ la vico de facileco kaj komprenebleco por la legantoj.



Unue ni rekomendas “Esplorado de Vivĝojo” verkita de DEGUĈI Hidemaru kaj sekve, “Kreado de Vivĝojo” verkita de la sama aŭtoro. Poste “Diaj Vojsignoj”, “Diaj Vojlumoj” kaj “Vojo de Oomoto” verkitaj de Kunfondinto DEGUĈI Onisaburo.

#### **40. Kiam fondiĝis Oomoto?**

Oomoto naskiĝis en la jaro 1892 (la novjara tago en luna kalendaro), kiam Fondintino DEGUĈI Nao eniris en la staton de spiritposedo de la Prapatra Dio kaj ekparolis Diajn Vortojn.

Dio estas la Prapatra Dio, Kreinto de la Universo, kies nomo ofte aperas en “Kojiki” (kroniko pri malnovaj okazaĵoj) kaj “Nihonŝoki” (Kroniko Japana.) En tiu senco Oomoto estas religio kiu daŭre ekzistadis de la antikva tempo.

Dio, la Kreinto de la Universo, revenis al tiu ĉi mondo en 1892 por savi nunan mondon de la tumulto kaj putro kaj por konstrui eterne neŝanĝotan belan mondon.

Nu, de la jaro 1837 kiam Fondintino naskiĝis, ĝis la jaro kiam Oomoto aperis—estis la tempo de granda ŝanĝo en Japanujo. La regado de Tokugaŭa Bakufu (ŝoguna registaro) putris, malsatego atakis tutan parton de Japanujo, grandskala kampara puĉo, movado por faligo de ŝoguna registaro en diversaj lokoj, tia tumulta tempo.... Finfine Tokugaŭa reĝimo falis. Imperiestra registaro komenciĝis. Ankoraŭ post tio daŭris la konflikto inter nova potenco kaj malnova potenco. Nova nacia reĝimo ankoraŭ ne estis firme solidigita. En tia epoko Oomoto aperis.

Ĝuste en tiu tempo, okazis Civila Milito en Usono, Liberigo de Servutuloj en Rusio kaj aliaj liberigaj movadoj progresis. Aliflanke, kapitalismo rapide progresis kaj granda ŝanĝo okazis mondoskale.

#### **41. Kiu estas la Fondinto?**

Ĝenerale fondinto estas nur unu de la mondaj religioj (Kristanismo, Budhismo, kaj Islamo.) Tamen Oomoto havas du fondintojn: Fondintino DEGUĈI Nao kaj Kunfondinto DEGUĈI Onisaburo. Tio estas unu el la karakterizoj de Oomoto. Fondintino skribis la librojn "Diaj Revelacioj" kaj Kunfondinto skribis la librojn "Rakontoj el la Spirita Mondo". Fondintino koncize eksplikis pri la regulo de Dio. Kunfondinto instruis kaj klarigis la regulon al modernuloj en facile komprenebla maniero en la kampoj de politiko, ekonomio, edukado, religio kaj arto. La fundamento de la instruo baziĝas sur la instruoj de du fondintoj. Ni konsideras ke Fondintino kaj Kunfondinto aperis por gvidi ne nur Oomotanojn sed ankaŭ por gvidi la homaron.

## **42. *Kia persono estis la Fondintino?***

DEGUĈI Nao fondis Oomoton, kaj ni nomas ŝin Fondintino. En la jaro 1837 ŝi naskiĝis en la nuna urbo Fukuĉijama, gubernio Kioto. Ŝi kreskis en ekstreme malriĉa familio; ŝi neniam lernis skribi aŭ legi. Ŝi servis kiel lernoknabino kaj maturiĝis. Ŝi vivis tre modeste kaj pure kaj plej fidele servis al siaj gepatroj, ke tiama feŭdestro en Fukuĉijama honoris ŝin pro ŝia fideleco.

Post maturiĝo ŝi edziniĝis, kaj vartis ok gefilojn, dume ŝi spertis multajn malfacilaĵojn kaj suferojn. Ŝi kompatis malriĉajn, molestatajn homojn malgraŭ siaj malfeliĉaj cirkonstancoj.

En la novjara tago en 1892, DEGUĈI Nao je la aĝo de 57 subite eniris en la staton de Di-posedo. Neregebla forto igis ŝin elbuŝigi: "Mi rekonstruos ĉi tiun mondon kiel la originan Dian mondon." Sekvis Diaj Vortoj el ŝia buŝo: kiel ni vivu juste, admono al homaro kaj profetaĵo de Mondorekonstruo. Ĉi tio estas la naskiĝo de Oomoto.

La voĉo de Dio venis el la fundo de ventro de la Fondintino, poste Dio komunikis pere de tuĉpeniko—Dio igis Fondintinon preni tuĉpenikon kaj ŝi aŭtomate skribis Dian mesaĝon.

Ŝi priverŝis sin per akvo multfoje eĉ en vintro kaj purigis sian

korpon kaj spiriton. Post la purigado ŝi prenis la tuĉpenikon kaj skribis la Vortojn de Dio. Ŝi skribadis dum 27 jaroj ĝis sia forpaso je la aĝo de 83 en 1918. La nombro de paperfolioj estas ĉirkaŭ 200,000. Poste ŝia skribaĵo estis prezentata kiel “Diaj Revelacioj”. Kune kun “Rakontoj el la Spirita Mondo,” ĝi konsistigas du Sanktajn Skribojn de Oomoto.

Severa kaj gracia vivo de Fondintino, kvazaŭ blanka umefloro en frosta vintro, alportas neesprimeblan, gracian temperamenton kaj edifis kredantojn.

### **43. *Kia persono estis la Kunfondinto?***

Ni nomas DEGUĈI Onisaburo Kunfondinto. Lia antaŭa nomo estis UEDA Kisaburo. Li naskiĝis en malriĉa terkulturista familio en 1871 en la suburbo de Kameoka. En la jaro 1898 kiam li estis 28 jaraĝa, li estas abrupte alprenata al kaverno de la monto Takakuma laŭ la gvido de la spirito. La asketismo daŭris sep tagojn. Dum tiuj tagoj li sidis sur roko en frosta vintro. Al li ne estis permesate trinki eĉ unu guton da akvo. Dum la asketismo lia animo eliris el lia korpo kaj esploris tra spirita mondo. Li ekkonsciis sian mision de la savanto de la mondo.

En la jaro 1900, li edziĝis kun DEGUĈI Sumiko, la plej juna filino de DEGUĈI Nao (poste ŝi fariĝis la Dua Gvidantino). Li instalas la bazon de Oomoto; diktis la “Rakontojn el la Spirita Mondo”, enkondukis Esperanton, komencis la kunlaboron kun mondaj religioj, progresigis artan movadon. Onisaburo donis preskaŭ ĉiun bazon de nuna agado de Oomoto. Sed La Dua Oomoto Afero (subpremo) okazis en 1935, kaj Onisaburo estis en malliberejo dum 6 jaroj kaj 8 monatoj. Tiel li havis neesprimeblan malfacilon por savi la mondon, kaj en 1948 li finis subliman vivon kun multaj sortoŝanĝoj. Li kun profunda scio respondis demandojn prompte kaj klare, kaj donis mondiskalan doktrinon kiel mondosava instruo. Liaj vortoj kaj agoj

estis plena de amo. Li estis granda homo kiu trankvile akceptis diversajn persekutojn, kaj instruis kaj gvidis ĉiujn kun amo eĉ kontraŭstarantojn.

#### **44. *Kia persono estas la nuna Gvidantino?***

Nuna gvidantino de Oomoto nomiĝas DEGUĈI Kurenai. Ŝi naskiĝis en 1956 en la urbo Kameoka, Kioto. De sia juneco ŝi servis al la Tria Gvidantino kaj la Kvara Gvidantino, kaj ricevis intiman edifon de ili. Ekde la juneco ŝi diligente lernis japanajn tradiciajn artojn kiel teceremonio kaj noa dramo. Post kreskiĝo ŝi aplikis sian pasion al la studo de farmacio, precipe orienta farmacio. Post kiam ŝi enoficiĝis kiel Spirita Gvidantino, ŝi praktikas la vojon kiun Fondintino, Kunfondinto kaj Gvidantinoj establis. Ŝi penas por paca agado bazita sur la instruo, socia movado protekti la dignon de homa vivo, movado kiu celas plibonigon de agrikulturo kaj vivmedio. Ŝi gvidas la membrojn lerni Esperanton kaj praktiki ĝin, kaj labori en la kampoj de arto, kulturo kaj sociala bono.

#### **45. *Kial Oomoto estis persekutata dufoje?***

La unua subpremo okazis en 1921, kaj la dua en 1935. Precipe en la dua subpremo, Oomoto ricevis drastan persekutadon. 1933 kaj 1934 estis la tempo kiam la mondo faŝismiĝis. Tiam Oomoto establis la asocion celante spiritan reformon de Japanujo. La movado disvolviĝis tra la tuta Japanujo, kaj akiris la milionojn da simpatiuloj. La tiama registaro miskomprenis la movadon kontraŭregistara. Precipe la troigo de la movado de la ekstrema parto kaj miskompreno de kredantoj al la movado kaŭzis la kompletan subpremon.

La opreso estis pro la suspekto pri la rompo de la Leĝo por Publika Ordo kaj malrespekta krimo kontraŭ Imperiestro. En la afero, ĉefuloj—Kunfondinto Onisaburo, Dua Gvidantino Sumiko,

Kungvidanto Hidemaru—kaj aliaj 50 estraranoj, estis metitaj en malliberejon. Aŭtoritatoj trude detruis la tombon de Fondintino, Centron en Ajabe kaj Kameoka, kaj centojn da instalaĵoj en tuta Japanujo. Ĵurnaloj, gazetoj raportis “Oomoto estas herezo,” deforminte la veron. La verdikto de supera kortumo pri la rompo de la Leĝo por Publika Ordo deklaris senkulpa. La Plej Supera Tribunalo reĵetis apelacion, kaj verdiktis senkulpa.

Malrespekta krimo kontraŭ Imperiestro nuliĝis pere de la malvenko de Japanujo en 1945. Oomoto tute fariĝis senkulpa.

#### ***46. Kion signifas la emblemo de Oomoto?***

La emblemo de Oomoto estas dek cirkloj. La cirkloj estas metitaj jene: granda cirklo estas en la mezo kaj etaj cirkloj estas cirkaŭ la granda. Dek cirkloj simbolas la grandan universon. La numero dek signifas plenan kaj perfektan. En Oomoto, la emblemo de dek cirkloj signifas vigan laboron de Dio kiu etendiĝas senlime. Laboro de Dio estas plena tra la granda universo de la antikvo ĝis la eterno.

Oomoto ankaŭ havas alian emblemon: kruco en cirklo. Ankaŭ ĝi havas la saman signifon. Kruco signifas volon kaj laboron de Dio. Cirklo signifas grandan universon.

#### ***47. Kie estas la sankta tereno de Oomoto?***

Sanktaj Terenoj de Oomoto troviĝas en la urboj Ajabe kaj Kameoka en la gubernio Kioto. Ajabe estas je ĉirkaŭ unu horo per JR-rapida trajno (San' in-Linio) de la stacidomo Kioto. Ajabe estas la loko kie Oomoto naskiĝis kaj la tereno nomiĝas Bajŝoo-en, ĝi estas la centro de diservo. Grandaj Festoj, servoj por prapatroj estas celebrataj en Ajabe.

Kameoka estas 30 minutojn per JR-trajno (San' in-Linio) de la stacidomo Kioto. La Sankta Tereno en Kameoka nomiĝas Ten'on-

kjoo, kaj estas la centro de edukado kaj instruo. Tie troviĝas la Granda Kursejo, presejo, internaca fako ktp. Bajŝoo-en kaj Ten'on-kjoo ambaŭ estas serenaj terenoj, ĉirkaŭataj de verdaj arboj. Kredantoj honoras la sankajn terenojn kiel la hejmlokon de animo kaj la plej sanktan lokon kie loĝas Dio.

#### **48. Kiom da kredantoj estas en Oomoto?**

La nombro de kredantoj estas ĉirkaŭ 180,000. La kredantoj troviĝas tra la tuta lando, de la norda parto—Hokkajdo ĝis la suda parto—Kagoŝima, kaj Okinavo.

Multaj kredantoj kaj simpatiuloj troviĝas eksterlande, en Nord-Ameriko, Sud-Ameriko, Sud-okcidenta Azio (Filipino), Mikronezio (Ponpeio), Usono, Eŭropo kaj Mekisikio. En Brazilo troviĝas la Sud-Amerika Centro.

#### **49. Kion la membroj faru?**

Ni proponas ke membroj instalu la altarojn por Dio hejme, kaj ĉiutage oferu preĝon. Ankaŭ ni proponas ke membroj instalu la altarojn por la prapatroj. Pro la preĝo de posteuloj, la animoj de prapatroj ricevos la benon de Dio, kaj progresos kaj multe ĝojos en la spirita mondo. Tiel, ni esperas, la membroj oferos dankemon kaj preĝon al Dio ĉiutage, kaj praktikos la instruon, kaj preĝos por feliĉo de prapatroj en la spirita mondo. Plie ni rekomendas al la membroj legi sanktajn skribojn kaj kompreni la volon de Dio, praktiki la instruon en ĉiutaga vivo, kaj akumuli piajn agojn kaj kompreni la valoron de harmonia mondo sen milito, kaj pozitive peni servi sindone. Ni esperas ke la membroj transdonos la ĝojon de kredo al aliaj per sia servado, kaj disvastigos ĝin. Ankaŭ ni esperas ke la membroj kontribuos la financan subtenon por Dia laboro.

## **50. *Kia estas la strukturo de la Centra Oficejo?***

Oomoto havas la Centrajn Oficejojn en la sanktaj terenoj de Ajabe kaj Kameoka kaj en la ĉefurbo Tokio.

Sub la Spirita Gvidantino funkcias la Sekretariejo kiu administras ĉiujn fakojn de rita fako, fako por ĝeneralaj aferoj, fako por religiaj aferoj, ktp. La Ĉefdirektoro administras tutan organizon kiel la Respondeca Direktoro. La Centra Oficejo plenumas la administran laboron de la tuta organizo, kaj la Konsilio de Rezentantoj, kiu konsistas el la reprezentantoj elektitaj inter la kredantaro, diskutas pri gravaj taskoj de la administrado.

Por plenumi la laboron en respektivaj kampoj, sub la Sekretariejo funkcias religia, arta, redakcia, eldona fakoj; virina societo kaj junulara societo ktp. Ankaŭ estas satelitaj organizoj: Ĵinrui Aizenkai (Universala Homama Asocio), jurpersona korporacio Aizen Mizuhokai (societo por disvastigi enziman organikan agrikulturon), Esperanto-Populariga Asocio, jura persono por publika bono Aizen Ŝinkokai ktp.

## **51. *Kia estas la loka organizo?***

Loka organizo de Oomoto troveblas en ĉiu parto de Japanio en pli ol sepcent lokoj. Lokaj centroj estas nomataj Hon'en aŭ Bun'en, kaj tie oni havas altarojn kaj preĝejajn halojn. Aliaj lokaj centroj kun malpli grandaj kongregacioj estas nomataj Ŝukai. Tiuj lokaj centroj ekzistas en preskaŭ ĉiuj gubernioj, kaj sub ili estas lokaj filioj, kiuj troviĝas en propraj hejmoj de la membroj. En ĉiuj lokaj organizoj oni celebras monatajn festojn unufoje en la monato.

## **52. *Kion Oomoto faras por la socio?***

Oomoto laboras por plibonigi la socion, emfazante la agadon savi animojn de homoj. Ni centrigas nian movadon en disvastigo de instruoj; ni penas serenigi kaj plibonigi la homan koron. Ni eldonas gazetojn kaj librojn; ni elsendas programerojn per radio; ni elsendas informojn per reto, kaj okazigas prelegojn kaj kunsidojn.

Oomoto havas jenajn satelitajn organizojn kiuj penas por plibonigi la socion: Ĵinrui Aizenkai, Universala Homama Asocio, laboras por disvastigi la fratecon de homaro kaj plialtigi la homan kulturon, kaj establi eternan mondpacon, bazite sur la spirito de ambono, trans la muroj de rasoj kaj religioj. Ĝi ankaŭ penas por interreligia kompreno kaj kunlaboro, kaj por establi Mondofederacion. Esperanto-Populariga Asocio penas por popularigi la internacian lingvon Esperanto, kaj Aizen Mizuhokai instruas agronomian teknikon kaj agrikulturan administradon. Aizen Ŝinkookai administras infanvartejon, kaj jura persono por publika bono Konohana administras azilon por maljunuloj. Akcia kompanio Tenseiŝa presas kaj eldonas librojn kaj gazetojn de Oomoto.

### ***53. Kial Oomoto vigle laboras en artaj movadoj?***

Estas tri vojoj por komunikiĝi kun Dio: religio kaj moralo estas la vojo por komunikiĝi kun Dio per bono kaj amo; scienco per vero kaj racio; arto per belo. Inter tiuj tri vojoj, arto estas la vojo facile komprenebla kaj ellernebla por junuloj kaj maljunuloj.

Oomoto laboras en artaj movadoj ĉefe je arta asocio Rakutenŝa. Kunfondinto DEGUĈI Onisaburo deklaris: “Arto estas la patrino de religio.” La movado de la naturo kaj kreado de la mondo estas granda arto de Dio, kaj el tiu granda arto de naturo naskiĝis religio. Ni penas progresigi la sentimenton de homoj pli sane kaj riĉe per artisma vivo.

Arto kaj religio, kvazaŭ ambaŭ radoj de veturilo, kondukas nian vivon pli bone kaj bele. Homo, kiu studis arton profunde, venas al



religio, kaj homo kun profunda kredo pasigas elegantan artisman vivon. En tiu senco Oomoto emfazas la arton, kaj penas disvastigi la arton kiel la grava elemento esenca por la vivo de homaro.

#### **54. Kial Oomoto enkondukis Esperanton?**

Esperanto estas ne nur konvena komuna lingvo de la mondo, sed ĝi ankaŭ enhavas la esperon de la homaro ke ni malfermu nian koron kaj amikiĝu reciproke.

D-ro Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto, pro siaj tragikaj spertoj, deziris solvi la konfliktojn de la mondo per popularigo de komuna lingvo. Li alvokis al homaro la kredon en unusola Dio trans la diferenco de religioj kaj denominacioj. La signifo de la internacia lingvo Esperanto akordas kun la mondokoncepto de Oomoto: ĉiuj membroj de la homaro kune ĝuu siajn vivojn kiel gefiloj de unu Dio. Tio estas la kialo ke la Kunfondinto DEGUĈI Onisaburo enkondukis Esperanton en Oomoton en 1923.

#### **55. Kion Oomoto pensas pri agrikulturo?**

Oomoto estimas teron. Fondintino DEGUĈI Nao instruis ke la bulo da tero fariĝos pli valora ol mono, kaj Kunfondinto DEGUĈI Onisaburo strebis terkulturi en sia juneco, kaj instruis terkulturon al la membroj. La Dua Gvidantino heredis tiun tradicion, kaj establis la jurpersonan korporacion Aizen Mizuhokai; ŝi enoficiĝis ĝia unua prezidanto, kaj disvolvis produktomultigan projekton tutlande kun emfazo sur la plibonigo de kvalito de tero. Tiam, la membroj de Aizen Mizuhokai nombriĝis kvardek mil, kaj la simpatiuloj estis kvarcent mil.

Poste, modernaj teknikoj de agrikulturo—kemiaj sterkoj kaj agrokulturaj medikamentoj—disvastiĝis tutlande, kaj nia movado fari ĝis malfacila. La Tria Gvidantino DEGUĈI Naohi multe zorgis pri

tiu tendenco, kaj deziris doni bonan ekzemplon por la agrikulturo en Japanio. Ŝi nomis nian organikan fermentintan sterkon Mjooĵoo (aŭrora stelo), kaj penis popularigi tiun sterkon, kaj deziris ke tiu sterko solvu la agrikulturajn problemojn en Japanio. Ŝi mem ŝvitis transplanti kaj rikolti rizon, kaj ŝi fariĝis modelo por la asocio. La Kvara Gvidantino DEGUĈI Kijoko staris ĉe la kapo en la kampanjo kontraŭ genrekombinado de terproduktaĵoj. Ŝi indikis ke tiu genrekombinado celas la profiton de kompanio ol homan sanon.

Aizen Mizuhokai gvidas produktadon de sendanĝeraj kaj bongustaj legomoj, kaj sistemigis la ratifikon de propra kulturmetodo. Nia asocio ankaŭ organizas studkunvenojn por konsumantoj. La Kvina Spirita Gvidantino DEGUĈI Kurenai penas transplanti kaj rikolti rizon kaj ŝvitas en sia legomĝardeno.

Aizen Mizuhokai, Jinrui Aizenkai kaj virina societo kune laboras por la problemoj de medio, agrikulturo kaj nutraĵo.

## **56. Kian aktivadon Oomoto faras eksterlande?**

Oomoto adoptis Esperanton en 1923, ekde tiam ĝia eksterlanda agado vigliĝis. Oomoto establis eksterlandajn ĉefsidejojn sinsekve en Eŭropo, Ĉinio, Tajlando kaj Brazilo dum dek jaroj de 1925. Oomoto kunlaboris kun religiaj kaj spiritismaj grupoj por la harmonio de homaro surbaze sur la frateco de homaro.

Tamen, tiuj agadoj interrompiĝis pro la subpremo de la registaro en 1935.

En 1946 Oomoto rekomencis la agadon, kaj en Meza kaj Suda Ameriko oni establis organizojn de Oomoto.

Nun Oomoto rete dissendas informojn esperante, ankaŭ en Japana, Angla kaj Portugala lingvoj.

Ekspozicioj de artverkoj de Oomoto okazis dum kvar jaroj de 1974 en 13 urboj en Francio, Britio, Nederlando, Belgio, Usono kaj Kanado, kiujn vizitis pli ol tricentmil spektantoj. La ekspozicio ricevis altan

takson en Eŭropo kaj Usono.

Kiel la Kunfondinto DEGUĈI Onisaburo instruis, “Arto estas la patrino de religio,” tiu artekspozicio donis la okazon de interreligiaj rilatoj kun Usona Episkopa Eklezio ĉe la Katedralo Sankta Johano en Novjorko kaj la Katedralo Graco en San Francisko.

En oktobro 1975, ĉe la Tridekjara Jubileo de la Establo de Unuiĝintaj Nacioj, reprezentantoj de mondaj religioj kolektiĝis en la U.N. kaj la Katedralo Sankta Johano, tiam Oomoto celebris diservon kaj preĝis por mondopaco.

Oomoto pliampleksigas la interfluan kun mondaj religioj: Budhismo, Hinduismo, Islamo, Judaismo, Kristanismo, ktp. En 1993, Oomoto organizis interreligian renkontiĝon ĉe Sanktejo Ĉooseiden en Ajabe: “Preĝofero kaj Mondoreligia Forumo” por jubilei la centjariĝon de la fondiĝo, kaj kune preĝis kaj diskutis pri medio kun mondaj religioj.

### ***57. Kion la junuloj de Oomoto faras?***

Junaj membroj de Oomoto de dek kvin jaraĝa ĝis tridekjara apartenas al Junulara Societo. Ili lernas la instruon kaj praktikas ĝin, kaj penas plibonigi kaj altigi sin; kaj kontribui por la progreso de socio; kaj servi por la volo de Dio, konstrui la idealan mondon.

Junulara Societo organizas kursojn por trejni ties membrojn en la centro kaj en lokaj filioj: kursoj de Esperanto, kursoj de rito, staĝoj de agrikulturo, por maturuloj; studentoj de universitatoj; de altlernejoj; de mezlernejoj, kaj geknaboj. Oni ankaŭ organizas Junularan Feston kaj Geknaban Feston ĉiun duan jaron en Kameoka. Membroj de Junulara Societo gvidas geknabojn, kaj penas informi pri la Mondofederacio, kaj aktive laboras por loka socio.

### ***58. Kio estas la karakterizaĵo de Oomoto?***

Ĉefaj karakterizaj punktoj de Oomoto estas:

- 1, En Oomoto troviĝas du Fondintoj.
- 2, Fondintoj kaj Spiritaj Gvidantoj rivelas la veron de Dio per siaj personecoj (vivmaniero).
- 3, Oomoto adoras la unu solan absolutan Dion, kiu estas la Kreinto de la tuta universo. Oomoto jesas kaj akceptas ĉion. Oomoto aspiras esti la centro de la mondo, kaj la plej sankta loko en la mondo.
- 4, Multaj membroj havas abundajn kaj profundajn spertojn de miraklo kaj kontakto kun spirita mondo.
- 5, Oomoto klarigas pri la spirita mondo detale.
- 6, Oomoto klare indikas sian mision savi la mondon, kaj la membroj laboras fervore por plenumi tiun mision.
- 7, Oomoto estas la modelo de la mondo, kaj kio okazis en Oomoto nepre okazos en la mondo poste.





